

LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA
ORGANO



POR LA
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:
West-Graafthijk (N.H.)
Nederlando.

Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75
1 ekz. f 0,03.
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
1 ekz. f 0,04.
(aŭ egalvaloro en aliaj valutoj)

FABELO PRI LABORO.

(Ida Heyermans)

Estis iam viro, kies vivo pasis en maldiligenteco. Li manĝis kaj trinkis kaj dormis kaj vojaĝis, sed laboron li ne faris; kaj li ankaŭ ne bezonis fari ĝin por perlabori la panon, ĉar li posedis sufiĉe da mono.

Je iu malserena vintromateno li vekigis; kaj ĉar la tago ŝajnis al li ankoraŭ sufiĉe longa, li ne pretigis sin por ellitiĝi. Tra la kurtenoj, kiuj pendis antaŭ la fenestroj de lia dormĉambro, li vidis, kiel malhela estas la ĉielo, sed tra la malfermita pordo li havis agrablan elrigardon al la antaŭĉambro. El la lito li povis vidi la belajn kurtenojn kaj la brilantan fornon, en kiu brulis la fajreto; kaj sur la tablo li vidis la matenmanĝon jam preta. La karberoj en la forno kraketis, la teakvo zumis sur la hejtilo. Ho, estis plezure vekigi en tia komforta ĉambro!

Kaj la viro, kiu ne laboris, pensis pri tio, kiel bone gustos al li poste la krakantaj bulkoj kun la freŝa butero kaj la aroma teo. Li metis la manojn sub la kapon kaj duondorme rigardis antaŭ si.

Li sentis sin kiel la azeno inter du fojnamasoj, kiu ne sciis, de kiu ĝi manĝos unue. Ĉar en la lito estis agrable varme; sub la dolĉaj lankovriloj estis agrable por ripozi, dum liaj okuloj vidis nur intimajn anguletojn en la ĉambro.

Sed se li ellitiĝus kaj li volvus sin en sia dika domvesto kaj li metus la piedojn en la molajn, feltajn pantoflojn kaj li kuŝiĝus en sia komforta apogseĝo kaj li trinkus sian teon per malgrandaj glutoj, tio estus ankaŭ plezura okupo.

Kaj ĝuste li volis decidi, kiam li subite aŭdis voĉon, diranta: „Tia maldiligentulo inter tiom da laboro!”

Subite li eksidis en la lito, ĉar li ne povis kompreni, de kie venas tiuj vortoj. Estis neniu en la ĉambro. La karberoj kraketis kaj la teakvo zumis, la kurtenoj pendis en grandaj faldoj, la forno brilis kaj la tablotuko estis gaja blankaĵo inter nur malhelaj koloroj.

„Mi imagis”, diris la viro al si mem kaj, laca pro la streĉo de la subita, rekta teniĝo, li ree kuŝigis sin sur la mola kuseno kun la delikata, tola tego.

Sed li kuŝis ne jam duonan minuton kaj jen la sama voĉo aŭdigis sin: „Tia maldiligentulo inter tiom da laboro!”

Nun subite li komprenis, de kie venas la voĉo. Ĝi parolis de inter la kurtenoj, kiuj pendis antaŭ la fenestro de la dormĉambro. La viro volis leviĝi, kaj esplori, ĉu iu sin kaŝis tie, kiam ĝuste profunda voĉo el la kurtenoj en la antaŭĉambro respondis: „Li estas granda maldiligentulo!”

Tiam estis, kvazaŭ el la forno iu kriis: „Estas honto!” Ankaŭ la pano kaj la butero parolis; la ĉambro estis plena de sonoj, ĉar ĉiuj objektoj ŝajne ricevis voĉon.

Alia homo eble ektimus, sed la mallaborema viro en la lito neniam aŭdis objektojn paroli kaj li opiniis, ke estos komike aŭskulti tion.

„Ho,” diris la kurtenoj, „kiam vi pripensas kun kiom multe da peno ni estas faritaj, kiel hontige estas do, ke somere ni devas kontraŭstari la sunon kaj vintre la malvarmon por tia maldiligentulo, kiu faras nenion. Multaj homoj devis labori por fari nin. Unue oni fortondis de la ŝafoj la lanon, kiu tiam estis tiritita en longaj fadenoj kaj el tiuj fadenoj oni teksis tiun ŝtofon, el kiu ni estas faritaj en la fabrikoj, kie la maŝinoj frapegis kaj bruegis. La aero iĝis plena de laneroj kaj la laboristoj enspiris ilin. Ho, kiam ni pripensas, kiel la maŝinoj sonegis kaj bruegis ĉiun tagon, kiel la laboristoj aŭdis ĉiun tagon la monotonan bruadon, faris ĉiun tagon la monotonan laboron kaj ĉiam enspiradis la lanerojn, de kiu la aero estis plena, ho, tiam ni povus plori, ĉar ĉiu laboro estas farita por li, la nenionfaranto.

Tiam la forno aŭdigis sin per murmura voĉo: „Silentu do, krieguloj. Aŭdante vin, oni ekpensus, ke nur la teksistoj devas labori. Sed laŭ mi estas pli granda honto, ke mi devas esti varma por tiu maldiligentulo; ĉu vi scias, kiom multe oni devis labori, antaŭ ol mi estis preta? Ĉu vi scias, el kio mi estas farita: el fero kaj ŝtalo.

Dum multaj horoj mi povus paroli pri la laboro, farita por mi. Unue oni devis alporti por mi la feron el la minoj kaj fortege oni devis frapi en la malmola tero antaŭ ol oni trovis tiun feron. Viroj kun fortmuskolaj brakoj devis ŝvitlabori, devis frapegi tiel ke la dorsoj brulis kaj la fingroj tremis. Poste ili povis transporti la feron supren kaj tiam ĝi venis en la fandejoj, kaj tie estis tiel varme, ke la karbofajro, kiu brulas en mi, ŝajnas al mi nur varmeta. Kaj la viroj devis elteni apud tiuj fornoj, preskaŭ nudaj ili laboris, kaj la varmegan aeron ili devis enspiri. Fine la fero estis preta, sed mi ankoraŭ ne ekzistis. Fortegaj viroj devis frapi kaj frapegi la feron; ho, multaj ŝviteroj falis sur min: ŝvitgutoj de la forĝisto, kiu martelis, de la knabo, kiu tiris la blovilon. Multegaj homoj el multaj landoj devis labori antaŭ ol mi estis preta; ŝipoj transportis min, la ondoj de la maro portis ilin, ĉevalo tiris min kaj por kio por tiu maldiligentulo en la lito, kiu ne laboras.

„Jes, jes,” akre diris la karberoj, „por tiu nenionfaranto. Ĉu ni devas forbruli por tiu viro? Ĉu ni devas iĝi fumo por li? Ĉar, ho ve, vi kurtenoj, kaj vi, forno, vi plendas, sed vi vivas multe pli longe ol mi. Sed ni faras nian devon, kiam ni forbrulas, kiam ni fariĝas cindro kaj fulgo kaj fumo! Kaj oni laboris por ni tiom longe, kaj nun ni varmigas maldiligentulon, nenionfaranton.

Dum kelkaj minutoj la karberoj silentis; tiam ili daŭrigis: „Antaŭ miloj kaj miloj da jaroj ni estis plantoj kaj iom post iom ni ŝtoniĝis. Tio daŭris multajn jarojn. Kaj en la mallumo de la tero ni dormis kviete, ĝis la homo malkovris nin. Tiam li fosis subterajn urbojn kaj ne estas eble, ke iam iu vidis pli pezan laboron ol ni. Al ni algluiĝis eble eĉ pli da ŝvito ol al la fero. Por ni viroj, virinoj kaj infanoj devis labori en lokoj, kie ili preskaŭ sufokiĝis; pro ni la kompatindaj ĉevaloj neniam plu revidis la sunlumon. Ni povas rakonti pri inundoj kaj eksplodoj; ni venas el la regno de nokto kaj mizero. Kaj la homoj, kiuj portis nin supren, ne enspiris lanerojn aŭ varmegan aeron de fandejoj, sed karbo-polvon kaj malutilajn gasojn.

Ili pasigis la pli grandan parton de sia vivo sub la tero; ho, malserena estas la regno, pri kiu ni povas rakonti. Kaj nun ni devas bruli por li, la maldiligentulo. Ĉu por tio oni tiel ege laboris?”

La karberoj kraketis, kvazaŭ ili ege ĝemis. Post tio ili silentis. Kaj la teakvo dum momento ĉesis zumi; silente la objektoj en la ĉambro aŭskultis kaj tiu silento estis post la multaj paroloj tiel timiga por la maldiligentulo, ke fakte li ĝojis, kiam la teakvo ek-

parolis: „Kaj ĉu vi do pensas, ke al mi estas ĝojo vaporiĝi por tiu nenionfaranto? Ĉu vi pensas, ke mi ĝojas, ke ĉiu laboro, kiu estas farita por mi, fakte servas al nenio, kiam mi devas boli por li, zumi por li? Multo devis okazi, antaŭ ol mi estis purigita. Tage kaj nokte oni devis laboradi por mi en la akvoturo, kaj nun mi estas trinkota de li, la mallaboremulo!”

„Kaj mi do,” plendis la teo en la skatoletto, „mi venas el Hindio. Malhelaj homoj devis labori sub la arda suno, kaj post tio mi faris longan vojaĝon. Kaj la ondoj dancigis la ŝipon en kiu mi estis; kaj la ventego hurlis ĉirkaŭ ni”

„Momenton mi pensis, ke ni pereos, sed la maristoj kaj la ŝipestro batalis kontraŭ la ventego kaj ondoj, kaj savite ni surteriĝis. Mi scias, ke mi poste venos en la bolantan akvon; sed tio estas indiferenta al mi, tio estas ja mia devo, mia destino. Sed la pensado pri la laboro de tiuj malhelaj homoj sub la arda suno kaj la danĝeroj de tiu longa marvojaĝo, tio estas malĝojiga, kiam oni scias, ke oni devas trairi la gorgon de maldiligentulo.”

Tiam la sukero volis ekparoli, sed la pano diris: „Lasu min ankaŭ ion diri. Mi aŭskultis kun intereso la plendojn de la kurtenoj, la forno, la karberoj, la akvo kaj la teo. Sed se iu havas kaŭzon por plendi, mi estas tiu. Ĉar baldaŭ la maldiligentulo ekmordos min; tuj li enigis la dentojn en mian kruston kaj mi devos nutri lin, lin, kiu faras nenion, kiu formanĝos min, ne pensante eĉ momenton pri la multa laboro, la peza laboro, kiu estis farata antaŭ ol mi fariĝis tia. Ho, miaj bonaj amikoj, eble mia rakonto estos iom pli longa ol tiuj de vi. Sed estas farita ja tiom da laboro antaŭ ol mi venis ĉi tien sur la tablon kaj nun mi devos malaperi en la stomakon de tiu nenionfaranto.”

La pano silentis kvazaŭ ĝi volis kolekti siajn fortojn por la rakonto. Kaj duafoje regis en la ĉambro malgaja silentado, dum kiu la maldiligentulo nur aŭdis la batadon de sia koro, kiu frapis: „Laboras mi, ne vi, laboras mi, ne vi.”

Tiam li ne plu aŭdis la internan voĉon, ĉar la pano ekparolis per mallaŭta, plenda, sed tre klara voĉo: „Unue mi estis semo; sed ne tuj oni povis meti min en la teron. Ne, la teron oni devis prilabori; la plugilo estis tirata tra la grundo, peze kaj profunde, kaj sulkojn ĝi faris. Kaj antaŭ la plugilo paŝis la ĉevaloj kun pendantaj kapoj kaj tiris ĝin per la tuta forto de siaj muskoloj. Kaj post la plugilo paŝis la farmisto. Matene antaŭ la tagiĝo li ellitiĝis kaj li laboris plue, ĉu la suno brilis, ĉu la pluvo falis sur lian malbone kovritan

korpon. Kaj li laboradis, kiam la vento hurlis ĉirkaŭ li, kiam la nuboj estis pelataj de la vento kaj ĉio ŝajnis esti malĝoja. Kiam fine le tero sufiĉe estis prilaborita, la semo estis enmetata kaj tie ĝi dormis, ĝis la sunradioj penetris en la teron kaj vekis ĝin, promesante lumon kaj vivon.

Tiam la semo ege eklaboris! La radiketoj malsupreniris kaj serĉis nutraĵon; la trunketoj iris supren kaj serĉis la vojon tra terbutletoj kaj ŝtonetoj, ĝis kiam ili elvenis super la teron. Kaj post tio ĝi ĉiam kreskis kaj la radikoj laboris multe kaj fine, jen: nun spikoj estis kreskintaj el la semo. Kaj tiuj spikoj portis novajn grajnoj en si; kaj la suno, la vento, la pluvo favore laboris por kolorigi tiujn grenspikojn orflavaj, belege flavaj.

Kaj sub la arda Aŭgustosuno venis la rikoltantoj kaj ili falĉis la grenon, kaj ili ne prenis tempon por hejmeniri por la manĝado, sed kiam dum la tagmezo estis plej varmege, ili kuŝigis sin sur la teron kaj ripozis kun la vizaĝo turnita al la tero. Kaj virinoj forlasis siajn hejmojn por ligi la grenon kaj infanoj for estis el la lernejo por helpi en tiu laboro; tutaj familioj laboregis por hejmenporti la rikolton.

Kaj ankoraŭ mi ne estis tio, kio mi nun estas. Sur la draŝejoj oni laboris por elfrapi la grenerojn el la spikoj, kaj la muelisto devis mueli kaj la bakisto devis knedi, antaŭ ol mi povis eniĝi la fornon. Por liveri min vere freŝa kaj bongusta la bakisto ne estis dum la pasinta nokto en la lito. La tutan nokton li staris antaŭ la varmega forno, kaj mi vidis, kiel laca kaj pala li estas.

Dum la tuta jaro oni laboras por produkti min kaj nun mi estas manĝota de tiu maldiligentulo. Ĉu por tio la kamparano laboris sub la pluvo kaj la suno? Ĉu por tio virinoj klinis sin super la arda tero tagon post tago? Ĉu por tio la bakisto maldormis la tutan nokton?"

Neniu el la objektoj respondis tiujn demandojn. Nur la koro de la nenionfaranto denove frapis: Laboras mi, ne vi, laboras mi, ne vi.

Tiam ree aŭdigis sin plenda voĉo. Ĝi venis de la pentraĵo kaj ĝi diris: „La akvo, la teo, la pano kaj la karberoj ne estas laŭ mi la plej kompatindaj. Ili nur unu fojon koleras, sed ni: la forno, la kurtenoj, kaj mi, ni estas jam tiom longe ĉi tie kaj ni devas jam tiom longe servi tiun maldiligentulon.

Ho, karaj amikoj, se mia kreinto scius, ke ĉi tie mi pendas, li verŝus sangajn larmojn. Vi ĉiuj rakontis, kiom da homoj devis

labori por produkti vin; sed mi estas la verko de nur unu homo. Jen, mi ne parolas pri mia kadro, nek pri la farbo, kiu estis necesa; sed kio donis al mi animon, tio estis la animo de la pentristo. Mi povas rakonti, kiom li luktis por produkti min; longajn horojn li pripensis antaŭ ol li komencis, kaj kiam li fine sentis, ke li komprenas sian intencon, li eklaboris, kaj en unu tago li ree ŝanĝis, kion li faris en la antaŭa, ĉar image li vidis min ĉiam pli bela kaj ĉiam pli perfekta. Jen li havis emon detrui min, jen li laboradis dum longaj horoj je mi, ĉar lia mano kapablis, kion lia spirito deziris. Mi estas parto de homvivo; mi estas la plej alta el tio, kion nobla homo pensis kaj sentis; en mi vivas kaj vibras spirit- kaj manlaboro.

Kaj nun, nun mi pendas en ĉambro, kie mallaboras nenionfaranto. Kaj ĉiun tagon li vidas min kaj ĉiun tagon mi parolas al li per la lingvo de l' laboro, sed li ne laboras, li pasigas sian vivon en maldiligenteco."

„Kaj mi do," diris la ĵurnalo, kiu kuŝis sur la tablo apud la pano.

Se iu klare parolas al li, mi estas tiu. Sed mi silentu pri la laboro, kiu estas farita por mi: kiel la presistoj devis maldormi la tutan nokton por meti unu litereton apud alian, ĝis kiam iliaj okuloj ekdoloris pro la fiksrigardado al la literoj. Sed ĉiun matenon mi rakontas al la maldiligentulo pri la sufero, kiu ekzistas sur la tero; pri la mizero kaj la malriĉo. Mi diras ĉiun matenon al li, ke tiu, kiu volas helpi, ĉie povas helpi; sed blinda kaj surda li estas; antaŭ liaj okuloj estas la vualo de la maldiligento, en liaj oreloj estas la vato de la maldiligento."

Pli laŭte frapis la koro de l' viro en la lito: Laboras mi, ne vi.

Kaj tiam ekparolis iu en lia korpo. La stomako plendis per obtuza voĉo: „Mi laboras la tutan tagon por li, mi digestas la nutraĵon, kiun aliaj homoj produktis. Por kio, por kio?"

Kaj la koro frapis: „Eĉ ne momenton mi haltas; tage kaj nokte mi pelas la sangon tra lia tuta korpo, kaj ĉien mi alportigas nutraĵon: al liaj cerboj, kiuj nur pri amuzaĵoj pensas; al liaj kruroj, kiuj neniam portas lin al ia laboro; al liaj manoj, kiuj neniam faras ion por aliaj homoj. Kion li faras per la forto, kiun mi donas al li?"

Kaj la pulmoj ĝemis: „Kial ni devas spiri tage kaj nokte? Kial? Kial?"

Kiam la viro en la lito aŭdis ĉiujn tiujn voĉojn en sia korpo, li ne plu povis elteni sub la kovriloj kaj per unu salto li estis ekster la lito. Rapide li surmetis la vestojn, sed ne tiel rapide, ke li ne povis ne aŭdi, kiel ili grumbas pri tio, ke ili estas faritaj kun granda

peno kaj nun estas portataj de iu, kiu faras nenion. Precipe la supra ĉemizo plendis; ĝi rakontis, ke malriĉa kudristino faris la faldetojn; horojn ŝi sidis kudranta ĉe lampeto, kiu nur malmultan lumon donis, ĝis kiam ŝi ricevis kapturniĝon pro laciĝo.

La akvo, per kiu la maldiligentulo lavis sin, flustris en liaj oreloj pri pena laboro; la sapo, kiu ŝaŭmis, flustris, ke ĝi estas la produkto de multaj manoj; kombiloj kaj brosoj parolis pri la multa laboro, kiu estis necesa por fari ilin; tiun matenon ĉiuj objektoj havis voĉon, kaj ĉies voĉoj kuniĝis en unu plenda, riproĉa kanto pri laboro: ĝemiga, peniga, ŝvitiga laboro.

Tiam la viro hontis kaj longan tempon li iris en sia ĉambro tien kaj reen. Ekstere falis la neĝo en grandaj flokoj. La teakvo ne plu zumis, ĉar la hejtileteto estingiĝis; la karberoj jam ne kraketis, sed nur ardetis.

Tre, tre silente estis ekstere kaj interne, sed en tiu silento parolis la konscienco de la maldiligentulo, kaj ĝi ordonis al li labori.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Theo Thyssen kaj N. van Hichtum permesis al ni, traduki el iliaj verkoj.
2. Aperis artikoloj pri nia gazeto en la „Nieuwe Apeldoornsche Courant” kaj en „La Praktiko”.
3. Pro la ferio la sekvanta numero aperos la 16an de Aŭgusto.
4. La unua numero restas aĉetebla.
5. Se grupoj de almenaŭ dudek personoj ekster Nederlando abonas nian gazeton, ili pagas la nederlandan abonprezon.
6. Varbu abonantojn kaj sendu tuj la adresojn.
Pri la pagoj ni skribos en la 3an numeron.
7. „The British Esperanto Association” mendis de ĉiu numero 25 ekzemplerojn por vendi en Anglujo.

LA JARABONO ESTAS:

| | | | |
|------------------|------------|-----------------|----------|
| Aŭstrio | 3.20 ŝil. | Germanujo | 1.75 M. |
| Britujo | 2.7 ŝil. | Hispanujo | 5 pes. |
| Belgujo | 15 fr. | Hungarujo | 3.30 p. |
| Ĉeĥoslovakujo .. | 16½ Ĉ. kr. | Latvujo | 2. l. |
| Danujo | 3 kr. | Norvegujo | 2.7 kr. |
| Francujo | 10 fr. | Polujo | 3.6 zl. |
| Svislando | 2. 10 fr. | Rumanujo | 72 l. |
| U.S.A. | 0.70 dol. | Svedujo | 2.70 kr. |
| Bulgarujo | 58 lev. | | |

LA LUPOJ.

(El la norvega lingvo tradukis: B. Karlsson.)

La lupoj estis foje tre danĝeraj. Okazis ke ili kolektiĝis en granda nombro kaj minacis la homojn tiel, ke estis danĝere veturi sur la vojoj.

Aasbjörn Tveitaasen estis en Gryteheidi en Norveglando kaj fiŝkaptis en la lago Sandvatnet. Estis dum la kristnaskotagoj. Mi restis tri tagojn kaj loĝis en dometo, li rakontis. La fiŝoj mordis bone. Tuj kiam mi hakis truon en la glacieron kaj elplendigis la fiŝkaptfadenon, ili mordis ĝin. Fine mi havis ŝarĝon, kiun mi apenaŭ povis porti. Mi iris hejmen iun posttagmezon.

La aero estis densa kaj blovis iom. La skioj glitis malbone; la neĝo algluiĝis al la skioj, ŝajnis kvazaŭ mi tiris ilin en gudro. Subite mi vidis, ke estas tri lupoj post mi; post tempeto ili estis sep- aŭ okope.

Mi komencis skii pli rapide kaj streĉis miajn fortojn. Sed la ŝarĝo estis peza, la glito de la skioj malbona, kaj mi ne povis forskii de ili. Mi komprenis bone, kial la lupoj persekutis min tiel intense; ili flaris la fiŝodoron, la bestoj.

Fine mi estis certa, ke estas dudek lupoj; ili iĝis pli kaj pli kuraĝaj: mi sentis, ke unu mordis la fiŝokorbon. Temis pri mia vivo. Mi turnis min flanken, tranĉis truon en la fiŝokorbon, prenis kelkajn fiŝojn kaj ĵetis ilin malantaŭen. La lupoj batalis pro la fiŝoj kaj mi spiris iom pli libere.

Sed jen ili estis denove. Mi ĵetis fiŝojn, ĝis mi ne plu havis; tamen la lupoj minacis min: ili flaris la fiŝodoron de miaj vestoj! Estis ne longa vojo al la loĝdomo, sed tamen ili atakis min tiel, ke mi plurfoje devis turni min kaj bati per la skibastono al la luparo. Tio efikis, mi forĵetis mian jakon; pro ĝi ili interbatalis iom tiel, ke mi atingis la kampojn proksime al la loĝdomo. Tiam ili ne kuraĝis sekvi min plu. Apenaŭ mi savis la vivon tiun fojon: mi estis tiom lacega, kiam mi venis en la domon, ke mi falis sur seĝon, pala kiel kadavro, diris Aasbjörn.

PAROLANTA KATO.

Mario tre amis bestojn. Ŝi vizitis la lernejon por elementa instruado. Ŝi bone lernis kaj ŝi ĉiam avancis¹⁾ ĉe la fino de la lernojaro.

Ankaŭ nun ŝi sukcesis kaj ŝiaj gepatroj interkonsentis donaci al ŝia filineto belan rekompencan. Ili lasis al ŝi la elekton kaj Manjo preferis ricevi neĝblankan katidon. Kompreneble ŝia deziro estis plenumata kaj baldaŭ oni vidis la knabinon, ludanta kun la blanka besteto. Ŝi havis ruĝajn okulojn kaj kiel ĉirkaŭkolo servis blua rubando kun tintiletoj, kiuj sonis dum ĉiu paŝo de la besto.

La kateto prospere grandiĝis kaj dormis en korbo kun mola kuseno, kiu staris en la studejo de Manjo. Ofte la besto saltis sur la skribotablon de la knabino, kiam ŝi sin okupis pri la studado de siaj lecionoj.

En ŝia lernejo oni ankaŭ instruis esperanton.

Iun vesperon ŝi pretigis sian taskon, donitan por nia internacia lingvo, kiam la kato saltis sur ŝiajn genuojn. Ŝi volis ĝin forpeli, sed ĝi ne moviĝis. Fine ŝi kolere kriis esperantlingve: „Foriru! Ĉu vi ne aŭdas min?” Kaj la kara besteto blekis: „Mi aŭdas, mi aŭdas!”

Samtempe ĝi subite forkuris.

Tuj Manjo rapidis al siaj gepatroj por rakonti, ke ŝi havas parolantan katon, ĉar ĝi respondas esperante.

¹⁾ avanci = transiri al pli alta klaso.

POR KOMENCANTOJ!

LUDOJ.

Mi vidas.

(Mi vidas ion, kion vi ne vidas.)

- Karlo: Mi vidas ion, kion vi ne vidas, ĝi estas ruĝa.
 Petro: La bluzo?
 Karlo: Ne.
 Lena: La floroj en la tapiŝo?
 Karlo: Ne.
 Adolfo: La beroj, la kraĵono, la ŝuoj, la rando, la robo, strioj sur la kurtenoj?
 Karlo: Ne.
 Petro: La floroj en la vazo?
 Karlo: Jes.
 Petro: Mi vidas ion, kion vi ne vidas. Ĝi estas flava.

K. t. p.

LA NEGOCISTO KAJ LA SIMIOJ.

Negocisto iris tra arbaro, kie loĝis multaj simioj. La viro portis grandan sakon kun ĉapoj sur la dorso. Tre laca li eksidis ĉe arbo por dormi kelkan tempon. Sed antaŭe li malfermis la sakon, prenis noktoĉapon kaj metis ĝin sur la kapon.

Kiam li vekigis, li ekvidis, ke la ĉapoj estas for! Li rigardis al ĉiuj flankoj kaj sur la arboj li vidis amason da simioj; kaj ĉiu simio havis ĉapon sur la kapo!

La viro tre koleris kaj insultis la bestojn! La simioj ekkriis laŭte al li! La viro ĵetis ŝtonojn al ili! La simioj ĵetis branĉetojn kaj fruktojn al li! Malespera, la viro tiris la ĉapon de la kapo kaj ĵetis ĝin sur la teron! La simioj ree imitis lin kaj pluvis ĉapoj!

La negocisto rapidege prenis ilin kaj forkuris, tre ĝoja, ke li rehavas siajn ĉapojn!

Leeuwarden, Nederlando.

adapte tradukis B. R.

Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.

Post kelkaj tagoj traduku la rakonton en esperanton.

Lernu parkere la avonturon de la negocisto kaj recitu la enhavon en via esperanto-grupo.

LA JONGLISTO.

Kamparano, kiu aspektis ne tre prudenta, staris sur la foiro kun korbo da ovoj.

Iu ĵonglisto alvenis kaj deziris trompi lin. Li aĉetis unu ovon, rompintis ĝin kaj prenis el ĝi unu arĝentan moneron (ĝi estis holanda guldeno). La kamparano tre miris pri tio! La ĵonglisto faris la samon per tri aliaj ovoj, sed nun la kamparano ne volis vendi plu da ovoj. Li fermis la korbon kaj forkuris.

Li eniris gastejon kaj eksidis en angulo de la stalo. Li malfermis la korbon kaj rompintis la ovojn, unu post la alia. Ĉar li kredis trovi en ĉiu ovo unu arĝentan moneron!

Sed, ho ve! Kiam li rompintis la lastan ovon, li fine komprenis, ke la stranga sinjoro rompintis lin!

Leeuwarden, Nederlando.

adapte tradukis B. R.



LA SUBSKRIBOJ DE LA BILDOJ.


- | | |
|----------------------------------|----------------------------|
| 1. Via kulpo! Ne, via! | 3. Ho, ho! Kio estas? |
| 2. Batu, Petro! Frapu lin, Niko! | 4. Multekosta interbatado! |

Rakontu la enhavon, kaj sendu la verkaĵojn al:

CORNELIA VAN TUSSENBROEK
Minervalaan 39 hs. Amsterdam Nederland.

El: „T. van den Brink en Th. Lancée, Onze eigen taal”, J. B. Wolters, Groningen-Den Haag-Batavia.

•.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ.λ



LA DUA LECIONO.

- | | |
|--------------|---------------------|
| 1. knabino. | 11. botelo. |
| 2. bastono. | 12. seĝo. |
| 3. mano. | 13. mur-horloĝo. |
| 4. libro. | 14. planko. |
| 5. glaso. | 15. bildo. |
| 6. vazo. | 16. flor-poto. |
| 7. floroj. | 17. kurteno. |
| 8. taso. | 18. fenestro. |
| 9. subtaso. | 19. muro. |
| 10. skatolo. | 20. fenestro-breto. |

1. La floroj estas **en** la vazo.
2. La sukero estas **en** la skatolo.
3. La bastono estas **en** la mano.
4. La teo estas **en** la taso.
5. La lakto estas **en** la botelo.
6. La akvo estas **en** la glaso.
7. La libroj estas **sur** la tablo.
8. La taso, la botelo kaj la glaso estas ankaŭ **sur** la tablo.
9. La tablo kaj la seĝo **staras** sur la planko.
10. La knabino **staras** ankaŭ sur la planko.
11. La mur-horloĝo **pendas** sur la muro.
12. La bildo **pendas** ankaŭ sur la muro.
13. La kurtenoj **pendas antaŭ** la fenestro.
14. La tablo **staras antaŭ** la fenestro.
15. **Kio** estas en la botelo? **La lakto** estas en la botelo.
16. **Kio** estas sur la fenestro-breto? **La florpotoj** estas sur la fenestro-breto.
17. **Kie** estas la botelo? La botelo estas **sur la tablo**.
18. **Kie** estas la flor-potoj? La flor-potoj estas **sur la fenestro-breto**.
19. **Kie** estas la teo? La teo estas **en la taso**.
20. La knabino: „Petro, kio estas **tio** kaj **tio**?”
Petro: „**Tio** estas floro kaj **tio** estas taso.”

- A. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
- B. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en esperanton.
- C. Respondu al la demandoj:

- | | |
|--|--|
| 1. Kio estas sur la tablo? | 12. Kie estas la subtasoj? |
| 2. Kio pendas sur la muro? | 13. Kie estas la flor-potoj? |
| 3. Kio estas antaŭ la fenestro? | 14. Kie estas la bildo? |
| 4. Kio estas en la vazo? | 15. Kio estas tio? (La instruisto montras per bastono la objektojn, kiujn la infanoj jam lernis. Li demandas: „kio estas tio?” La infanoj ĥore aŭ unuope respondas: „Tio estas la tablo, fenestro, muro k.t.p.”) |
| 5. Kio estas en la taso? | |
| 6. Kio estas en la skatolo? | |
| 7. Kio estas en la glaso? | |
| 8. Kie estas la floroj? | |
| 9. Kie estas la bastono? | |
| 10. Kie estas la kurtenoj? | |
| 11. Kie estas la knabino? | |

Allegretto mf. Trifoli ĉe montfino.... Por infanĉoj, aranĝis Boh. Valabtan

1. Tri-fo-li ĉe mont-fi-no, ĝin-ĉel-ĉis Ka-tari-no Va-li-ze-gon
 ze-gon ŝi-ple-ni-gis ŝaf-past-ut-oj-ti-am ŝin-hal-ti-gis. *I*
 Va-li-ze-gon ŝi-ple-ni-gis ŝaf-past-ut-oj-ti-am ŝin-hal-ti-gis. *gis. II*

2.

Haltu, ho Katarino
 Trifoli ĉe montfino
 Estas nia, estas nia
 Tuta kampo trifolia > dufoje

Slovaka popolkanto

Trad. I. V. DOLINSKY.

En Avignon, urbo en la sudo de Francujo, ĉe la Rono (Rhône) estas malnova ponto

En la 14a jarcento A. estis la loĝloko de la papoj, kaj tiam ne estis permesate al la homoj, transiri la ponton, kiam la papoj estis en la urbo. Por eviti tiun malhelpon, oni elpensis la jenon: Oni transdancis la ponton. El tiu tempo datas la malnova kanteto:

Sur la pont' de Avignon,
 Oni dancas en kadenco,
 Sur la pont' de Avignon,
 Oni dancas tut' en rond'.

Bussum, Nederlando.

H. B.

Korektu la kanton de Sari Marejs jene:
 Metu la lastan noton de la 7a takto kaj ankaŭ la du lastajn notojn de la 3oa takto sur la trian linion.

TERURE.

„Fraŭlino Mario ne plu kantas tiel bele, kiel lastjare.”

„Ha, terure devas esti, kiam kantistino rimarkas, ke ŝi perdas sian voĉon!”

„Sed ankoraŭ pli terure, kiam ŝi ne rimarkas tion!”

LA KULPO ESTIS ĜIA.

Sinjoro Weiss aĉetas papagon kaj sendas ĝin al sia edzino: Tagmeze, kiam li ree estas hejme, li demandas al sia edzino:

„Kie estas la birdo, kiun mi sendis al vi?”

„Mi rostis ĝin por la tagmanĝo”, respondis sinjorino Weiss.

„Vi rostis ĝin! Ĉu vi estas frenezeta? Estis ja birdo, kiu povis paroli!”

„Ho, kial do ĝi nenion diris?”

Nanterre, Francujo.

R. M.

„La Juna Esperantisto”

Leerboekje voor kinderen, 4 deeltjes met vertalingen door P. HEILKER, lid van het Lingva Komitato. 1e deeltje (4e druk) 35 cents, 2e deeltje (3e druk) 45 cents, 3e deeltje (2e druk) 50 cents, 4e deeltje 60 cents, vertalingen 35 cents.

Bestelling bij den schrijver te
Hoofddorp

POSTREKENING 38247.

Zoo juist verschenen bij:

N.V. Uitgevers Mij.

C. A. J. van Dishoeck, Bussum

een volledige Esperanto leergang

„PASO POST PASO”

1e deeltje f 0.75. 2e deeltje f 0.95
door

J. W. Minke en F. Boom de Vries

Verkrijgbaar in den boekhandel.

KORESPOND-ADRESOJ:

ĉiu vorto: 0.03 gld.

NEDERLANDO

18 infanoj deziras korespondi kun geamiketoj el ĉiuj landoj. Skribu al C. J. van Veenendaal, West-Grafdijk (N.H.), Nederland.

REKLAMTARIFO:

I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;
1/16 paĝo: 2 gld.

P.E.B

Ĉiu esperantisto havu sian propran bibliotekon. La altaj prezoj ĝis nun malebligis tion ĉi en esperantujo. La P.E.B. libroj tamen estas malaltaj en prezo. 6 lukse binditaj volumoj kostas nur f 7,50

Postulu prospekton

DUIVENDR. LAAN III

AMSTERDAM (C)

NEDERLANDO.



„FLORETOJ”

Porinfanaj Rakontoj
tradukitaj de la

„VENDREDA KLUBO”
en Winschoten
(Nederland)

Kun multaj koloraj kaj nigraj
bildoj

de C. Jetses

prezo 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
eldonisto:

J. B. WOLTERS

Groningen — Den Haag
Batavia.

Abonu tuj la popularsciencan dumonatan gazeton

SCIENCA GAZETO

Nun pligrandigita ĝi aperas sur 20 dense presitaj paĝoj kaj kovrilo. Plian pligrandigon ni projektas. Enhavas multegon da informoj sciencaj en facile legebla lingvo.

Jarabono: Unu dolaro usona (3 sv. fr.).

Specimeno kontraŭ respondkuponon.

AMERIKA ESPERANTO-INSTITUTO

556 State St., Madison, Wis., Usono.